# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 12. Febuaro 23, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**


## AMO 98 sukcese okazis – kun 40 partoprenantoj

Tiuj personoj loĝas en Eŭropo, Afriko kaj Azio. Mankis Norda kaj Suda Ameriko. Okazis ege interesaj prelegoj, kaj same interesaj diskutoj, kaj interŝanĝo de spertoj. Ni jam dissendis al la landaj asocioj la liston de la prelegoj. La prelegaro disiris ankaŭ kun EKO 11 en la 17-a de februaro – la seminario mem okazis en dimanĉo, la 19-a de februaro. La temo estis la Semajno de Internacia Amikeco, kiun UEA lanĉis antaŭ pli ol 50 jaroj. Pro tiu temo, ne surprize la konkludo de la fidela raportisto Marija Beloŝeviĉ, aktiva membro de la AMO-komisiono: La kunsido pasis ‘ ‘kun ege bona etoso’.

## AMO 99 pri fervojoj sekvas

Tio okazos enl a universitato de Pardubice en Ĉeĥio, kunlabore kun IFEF, nia fervoja faka asocio. Tio okazos inter la 4a kaj 7a de marto.

Mi sendas al vi Invitilon al la internacia faka seminario nome Eŭropaj fervojoj. Organizas Fakultato de Transporta Inĝenierio (Universitato Pardubice) kun Ĉeĥa Fervojista Esperanto Asocio kadre de projekto VERDEN kaj 30-a datreveno de ekesto de fakultato. La seminario okazos hibride.
Prelegos Rodica Todor, Vito Tornillo (ambaŭ IFEF), Lars Sözüer (BEMI) kaj Roman Štěrba (Ĉeĥa Fervoja Administracio). Viajn demandojn mi volonte respondos.
Bv. plusendi al viaj gekolegoj, interesuloj pri fervojo, transporto, daŭripoveco ktp.


doc. Ing. Jaroslav Matuška, Ph.D., Universitato Pardubice, Fakultato de Transporta Inĝenierio
Studentská 95, CZ-532 10 Pardubice 2


## Lernolibroj en Tanzanio

Mi daŭre instruas Esperanton per vacapo ĝis nun. Mi instruas la lingvon ankaŭ en ĉeesta grupo en la urbo Bunda (kie okazis la memorinda 6-a Afrika Kongreso)

Kiel sekciestro mi varbis instruistojn en regionoj de Tanzanio, kiuj kunlaboras kun la landa sekcio.de ILEI.

En la urbo Bunda:-
1. S-ron Mulele Mbassa Makaranga (mulelembassa@gmail.com)
2. S-ron Dismas Robert Kusaya (dismasrobert72@gmail.com)
3. S-ron Paulo Joseph (pauljoseph115@gmail.com)
4. S-ron Mramba Simba Nyamukinda (smbmramba@yahoo.com)

S-ron Jayrous Eliakimu (jayrouseliakimu@yahoo.com), (Mwanza)

S-ron John Emanuel Magessa (magessa.john@yahoo.com ) (Muleba)

S-ron Fidel Simeo Mayala (fidelsimeo@gmail.com) (Geita)

S-ron Hassan Gilala (p.o.box 147, Sengerema Tanzanio)

S-ron Barnabas Magese (barnabasmagese@yahoo.com) (Kahanga)

S-ron Sweetbert Mabushi (p.o.box 706, Shinyanga Tanzanio)

S-ron Wilson Matoyo (p.o.box 559,Musoma, Mara (Bugoji)
S-ron Charles K Hiza (chakhiza951@gmail.com) (Pangani)
S-ron Davido Mapengo (davidomapengo@yahoo.com) (Kahama)



En Arusha urbo:-
1. S-ron Costantino Mashauri (cmashauri@gmail.com)
2. S-ron Nyabange Japhet Chirimi (nyabangec@gmail.com)

La bildo montras scenon en la Parko Serengeti pri Kilimanĝaro, facile alirebla el la urbo Arusha.

Krom la instruistoj ni varbis ankaŭ aktivulojn:-
1. S-ro Francis Gendo, en Daresalamo (fgendo@gmail.com)
2. S-ro Aloyce Magari
3. S-ino Nyambona Masamba
4. S-ino Eusebia Matias, en Mwanza
5. S-ro Emmanuel Lyimo (emmyhilly534@gmail.com)
6. S-ro Batromeo Amos (Batromeo.amos@yahoo.com)
7. S-ro Sylvester Nyinyimbe (sylivesternyinyimbe@yahoo.com)

**Lernmaterialoj:**

La ILEI-sekcio de Tanzanio kunlaboras kun Eo-organizo nomata Bunda Esperanto-Kulturcentro, P.O. Box 25, Bunda Mara Tanzanio (bundaesperantokulturcentro@gmail.com)

La estraro de BEK estas:-
Prezidanto: S-ro Mulele Mbassa Makaranga

Sekretario: S-ro Paulo Joseph
Kasisto: S-ro Dismas Robert Kusaya

Bunda Esperanto-Kulturcentro havas jenajn celojn:-

1. Motivigi la Esperanto-movadon en Tanzanio
2. Varbi kaj instrui Esperanton al interesiĝantoj
3. Disponigi lernmaterialojn
4. Okazigi kursojn

Pri lernmaterialoj BEK strebas serĉi lernmaterialojn,kiuj disponiĝas al lernantoj en kluboj kaj grupoj en la regionoj. Tiujn lernomaterialonj foje al fojo ni ricevas kiel donacoj el nia eksterlanda amiko S-ro Piet Coppens el Nederlando, kiu subtenas nian instruagadon kunlabore kun Bunda Esperanto-Kulturcentro . De li ni jam ricevis libro-ekzempleriojn de:

1. Suahila-Esperanto vortaro
2. Gerda Malaperis
3. Esperanto per rekta metodo de Stano Marcek
4. Poŝamiko kaj kelkaj leglibrojn
5. Jifunze Lugha ya Esperanto (Nino Vessella),

krom tiuj ĉi li konsilis al ni sendi kopiojn de suahilaj lernmaterialoj al la organizo Scio Sen Barilo en Benino, ke la organizo helpis al ni represi la lernmaterialojn kaj resendu ilin al ni. Tion ni faris en la jaro 2019. Bonŝance oni preparis unu libron (Jifunze Lugha ya Esperanto) kaj resendis ekzempleron de ĝi al Burundo por represaĵo kaj kiam pretiĝis la laboro s-ro Gilbert Ndiyokubwayo (burundano) informis al mi pri dissendo de la suahila lernmaterialo; kiuj estis 500 ekzempleroj..

En Tanzanio ni ricevis 90 librojn, en Kenjo ni akiris 30 librojn kaj en DR-Kongo akiris 50 librojn.
La ceteraj libroj el 500 ekzempleroj restis en Burundo por la samideanoj kiuj lernas Esperanton per la suahila.

Nun ni havas mankon de vortaro Esperanto-Suahila, se estos ebleco ILEI sendu 10 ekzemplerojn de ĝi al Mulele Mbassa Makaranga,p.o.box 25,Bunda Mara Tanzanio

**Estas skandalo kaj honto, ke UEA ankoraŭ ne faris klaran decidon pri UK 2024, spite plurajn atentigojn kaj instigojn.**

## Jen la enhavo de la 101a numero de ‘Merkato’

• Vortoj al la legantoj (John Huang) …........................................2
• Kie estas nia merkato? (Ĉielismo Wang Tianyi).…...........................3
• Analizo de rilataj konceptoj de kampara turismo kaj la disvolva stato kaj tendenco de kampara turismo de Ĉinio (Ludoviko Zhao).………......6
• Bazaj Terminoj en Internacia Komerco (John Huang)……..…………......14
• Prezentas la mondon de Wix Wix-Partnero (1) (Yas Kawamura)……....18
• De butiko al bazaro (Andy Blair)……………………………………………..............23

## Luda rekomendo

Krom la ĉiu-dua-sabata SuperTuxKart-kunludado, estas alia ludo kiun ni planas ludi, nome la vortludon Verda Ŝtelo. Ni planas ludi ĝin nur per facilaj vortoj laŭ la difino de

retejo https://uea.facila.org. Tial ni pensas ke la ludo estos taŭga por lernantoj (kaj eble eĉ por komencantoj) sed ne nur por lernantoj.

Pri pli da detaloj vidu la priskribon ĉe Eventa Servo: https://eventaservo.org/e/777bec.
Se vi konas iun kiun tiu ĉi kunveno eble interesas, bonvolu helpi sciigi ilin.

Gergelj

# La tago de gepatraj lingvoj en Japanio

En japanio troviĝas endanĝerigataj lingvoj aŭ minacataj lingvoj.

La Ruĝa Libro de Endanĝeraj Lingvoj de UNESKO uzas la klasifikon: "Vundebla", "Minacata", "Grave endanĝerigita", "Kritike endanĝerigita" kaj "Formortinta".

La ajnua kaj la okinava lingvoj estas en la listo de endanĝerigitaj lingvoj en Azio.

https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_endangered_languages_in_Asia

*La ajnua lingvo (Ainu language)

*La okinava lingvo (Okinawan language) [en la insularo Rjuukjuu].
La Amami (en Rjukjuu), Haĉiĵo, Mijako (en Rjukjuu) estas minacataj.
La Jaejama (en Rjuukjuu), Jonaguni (en Rjuukjuu) estas minacataj.

Hirojuki Lokojama el Hokkaido: <hokkajda.esp.ligo@gmail.com>

========= vortoj: 960 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.